

la Riverego

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Septembro 1988-a. N-ro 12-a. Jarkolekto 3-a.

La nekredeblaj apusoj

de Sylvain Quirion

La apuso estas birdeto aspektanta kiel hirundo, kiu nur pezas inter 29 kaj 52 gramojn. Ĝi posedas flugil-larĝecon de 38 al 40 centimetrojn. Tiuj birdoj, bedaŭrinde nur aziaj kaj eŭropaj, flugas senĉese dum naŭ monatoj ĉiujare. Ili manĝas, dormas kaj eĉ sekskuniĝas flugante. Kiam ili dormas, ili malrapidigas sian ritmon de flugil-batado al po sep en sekundo. La normala kadenco estas po dek en sekundo.

La apusoj sin nutras nur per insektetoj, kiujn ili kaptas per sia granda beko ĉiam malfermita. Iliaj grandaj flugiloj kaj etaj kruroj ne ebligas ilin surteriĝi rekte sur la grundon, de kie ili ne povus reflugi. Kiam ili ĉesas flugi, nur por nestigi kaj kreskigi siajn apusidojn, la



apusoj al kroĉiĝas sur la flanko de klifo aŭ de domoj. La apusidoj forlasas la neston post unu aŭ du monatoj, kaj de la unua fojo neniam tien revenas. Ili flugos ĝis sia sekvanta ovo-demeto. □

Al ĉiuj membroj


La estraro de la Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn voĉdonrajtajn membrojn al **GRAVA** speciala ĝenerala kunsido, okazonta en Le Domaine Scout Saint-Louis de France (Vidu la artikolon pri la aŭtuna renkontiĝo), dimanĉon, 16-an de oktobro 1988-a, je la deka horo.

Tagordo:

0. Malfermo

1. Peto de novaj *Lettres patentes*. (Nepraj por havigi al ni la rajton doni impost-kvitancojn por donacoj. Laŭ la leĝo, ilin devas peti ĝenerala kunsido.)
2. Statut-ŝanĝoj
3. Fermo

Por la estraro,
la sekretario-kasisto



Sylvain Auclair

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto : 200.
ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktanto: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Patrice Mongeau kaj Sylvain Quirion

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 1,50 \$.

Limdato por la venonta numero: 1-a de decembro 1988-a.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal, Québec
KANADO H2G 3C8

Nova poemaro en Esperantio

Lundon 13-an de junio okazis en la Plant-Gardeno de Montrealo oficiala lanĉo de la unuaj du libroj: franclingva poemaro, eldonitaj de ELDONEJO ONDO: « Scribe haletante » kaj ĝia Esperanta traduko *Skribistino anhelanta*. Ĉeestis la lanĉon cento da homoj, inter kiuj troviĝis kvino da Esperantistoj.

Temas pri la unua Kebekia poemaro eldonita en Esperanto, do pri nova paŝo por la Esperanto-kulturo.

La poemojn verkis Hélène Blais, kaj ilin tradukis Esperanten Claude Lebuis. Hélène ne estas nekonatulinino. Ŝiajn poemojn oni plurfoje vidis en diversaj revuoj, inkluzive *la Riveregon*; ŝi ankaŭ prezentis spektaklojn en kantejetoj, dum la 70-aj jaroj; ekde 1985, oni ofte revidas ŝin scene, en la *Place aux Poètes*. En 1987, ÉDITIONS DU POLE eldonis aŝiŝon kun gravuraĵo de Monique Dussault kaj poemo de Hélène, dulingve (france kaj esperante): *Akuŝistinoj*.


Skribistino anhelanta tamen estas ŝia unua propra poemaro.

Sobre, sonore kaj volupteme verkita, *Skribistino anhelanta* dividiĝas en kvar partoj kaj tuŝas la jenajn temojn: verkado (*Koridoroj el inko*), amo (*Voluptemaj dancoj de niaj mestizaj paŝoj*), ina solidareco (*Komplikecoj de hartaŭzitaj Sirenoj*) kaj erotismo (*Almeti*

mian plumon sur ciajn sablokoksojn).

Eĉ se la libro estas tute nova, kelkaj poemoj en ĝi estis verkitaj antaŭ pli ol dek jaroj. Kunmetitaj kaj iom pluprilaboritaj, la poemoj mem sugestis tiujn kvar temojn., kvazaŭ temus pri kvar longaj poemoj, kun diversaj movimentoj.

Cetere, Hélène Blais instruas la francan lingvon, ĉefe al analfabetoj. Ŝi vidus ian utilon por Esperanto en tiu fako: regula skribmaniero eble estus bona enkonduko al skribado. Ŝi nun verkas sian doktorecan tezon pri aspektoj de analfabeteco. Kaj ankaŭ kelkajn poemojn.



Éditions Onde
Eldonejo Ondo
C.P. 31
Succ. Champlain
LaSalle (Québec)
Canada
H8P 3H9

Kaj nova eldonejo

Skribistino anhelanta kaj « Scribe haletante » estas la unuaj du libroj de ELDONEJO ONDO, en urbo LaSalle. Tiu eldonejo *volas promocii kebekian kaj kanadan literaturojn, france kaj esperante, tra franclingva kaj esperanta legantaroj.* La parta-tempa

eldonisto, Claude Lebuis, estas freŝbakita esperantisto, memlerninto. Li tre multe lertiĝis tradukante la poemojn de sia edzino Hélène: estas pli facile traduki poemojn en Esperanton ol en aliajn lingvojn, laŭ li, ĉar Esperanto ne havas fiksjajn frazkonstruojn kaj esprimojn; oni pli sekvu la originalan stilon.

Li nun laboras disvendante siajn librojn. La franclingvan oni povas

aĉeti en diversaj libro-vendejoj, ĉefe en Montrealo. La esperantan, ĉe la libroservo de K.E.A. kaj en ZONE LIBRE, strato Sainte-Catherine. La libro ankoraŭ ne eniris la ĝeneralan Esperanto-merkaton: tasko farota. Claude Lebuis ankaŭ havas aliajn eldon-projektojn kaj interesiĝus, interalie, eldoni lerno-librojn por kebekiaj franclingvanoj, por lernejoj aŭ por plenkreskuloj. Ĉu kunlaboro eblus? □

Le gaélique en Irlande

Dans toutes les anciennes colonies britanniques, on remarque la persistance de l'anglais, même si les langues locales ont acquis le statut de langue officielle lors de l'indépendance. La république d'Irlande ne fait pas exception.

Depuis son indépendance, en 1921, tous les gouvernements irlandais ont tenté d'augmenter l'importance du gaélique. Cependant, à part quelques régions où le gaélique avait survécu, tout le monde utilise toujours l'anglais pour ses activités quotidiennes.

Paradoxalement, c'est en Irlande du Nord, sous domination britannique, que le gaélique

gagne des locuteurs, malgré le mépris des Britanniques qui y sont majoritaires. Même la B.B.C. émet en gaélique et c'est en Irlande du Nord qu'est publié le seul quotidien gaélique. Il n'y a en Irlande que des hebdomadaires.

À cause de la mauvaise situation économique de l'Irlande, une grande partie de la jeunesse entrevoit l'émigration vers les États-Unis ou l'Australie comme seule solution. C'est l'anglais qui est alors important: le gaélique sera donc associé à la pauvreté. [tiré de *Monato*, juillet 1988] □

L'anglais, langue internationale ?

Ces dernières années, de nombreux immigrants se sont installés en Grande-Bretagne, pour des raisons économiques ou politiques. Et cela a engendré des problèmes linguistiques.

Cette année, à Londres, des enquêtes ont montré que 22,7% des élèves ne parlent pas anglais à la maison, et on compte 44 448 enfants qui ne parlent pas anglais couramment. Après l'anglais, les principales

langues sont le bengali, le turc, le chinois, le gujerati, l'ourdou, l'espagnol, le pendjabi, l'arabe, le grec et le vietnamien. Les professeurs d'une importante école londonienne sont aux prises avec des enfants parlant à la maison plus de 50 langues.

Ironie du sort: cette école est située sur la même rue que l'Association britannique d'espéranto... [tiré de *Monato*, juillet 1988] □

Petites nouvelles du monde

Vers la création d'un centre culturel de l'espéranto à Byalistok

L'idée en avait été lancée en août 1987 lors du Congrès mondial de Varsovie qui a rassemblé 5000 participants. Une réunion de travail en vue de concrétiser ce vœu s'est tenue à Byalistok même, en présence du président de l'UEA, Humphrey Tonkin, du président de l'Association espérantiste polonaise et du président du Parlement polonais. Le schéma de réalisation de ce centre a été présenté au Congrès mondial de 1988 qui tiendra ses assises à Rotterdam.

L'Association mondiale des médecins espérantophones fête son 80^e anniversaire

Fondée à Dresden (Allemagne) en 1908, elle groupe tout un éventail de spécialistes pratiquant la langue internationale: médecins généralistes, dentistes, pharmaciens, infirmiers, chercheurs, vétérinaires, etc. Elle possède des délégués officiels dans une vingtaine de pays, avec des sections actives au Brésil, en Bulgarie, en Chine, en Hongrie, au Japon, en Pologne et en U.R.S.S. Depuis 25 ans, un bulletin bi-annuel, *Medicina Internacia Revuo*, publie travaux et découvertes de ses membres. Une conférence mondiale a lieu régulièrement; indépendamment du congrès mondial d'espéranto, où des praticiens présentent des exposés scientifiques de haut niveau.

Application de l'espéranto aux sciences et aux techniques

Une conférence sur le thème précité s'est tenue à Proprad (Tchécoslovaquie) du 3 au 5 août. Les participants se sont penchés sur les perspectives apportées par l'utilisation systématique de l'ordinateur; ont également abordé les thèmes de la prognostique (science prévisionnelle), de la terminologie et des langues planifiées.

Albanie

Après des années de suspicion, voire même de persécutions à l'égard des espérantistes, on note un certain «dégel» de l'attitude des autorités... qui ont autorisé des conférences informatives à l'occasion du centenaire. Un espérantophone appartenant au personnel de l'ambassade de France supervise la rédaction d'un dictionnaire albanais-espéranto.

Yougoslavie

Un minimum de cinq millions de téléspectateurs a pu suivre de 11 décembre dernier le déroulement d'un télévisé presque uniquement consacré à l'espéranto. Durant l'année écoulée, 150 articles de presse, 200 émissions radio, 15 émissions télé ont été diffusées par les différentes chaînes. Deux grands journaux de Zagreb et de Sarajevo ont publié des feuillets sur le thème de l'espéranto. [nouvelles tirées de *Franca esperantista*, mai 1988]

L'espéranto dans l'espace

En plus des astéroïdes portant comme nom Espéranto ou Zamenhof, l'espace a maintenant accueilli un véritable espérantiste. Il s'agit de Bertalan Farkas, premier cosmonaute hongrois, qui a voyagé à bord du vaisseau soviétique Sallout 6. [tiré du supplément à «SAT-Amikaro», décembre 1987]

Langues, langues, langues

Langues. — Presque chaque peuple a une langue qui lui est propre; on en compte plus de 80. [tiré de *Atlas-Géographie par les Frères Maristes*, 1953]

Selon le dernier recensement mondial, paru en 1984, on a relevé, sans compter les dialectes, 5 445 langues sur la surface du globe. [tiré de *Circuit*, juin 1988]

Pour la communication européenne

Subventionné par la ville et le land de Hambourg, l'Office pour la compréhension européenne a été ouvert le 1^{er} mars dans le but d'aider la communication entre les institutions des pays de la Communauté économique européenne au moyen de la langue internationale espéranto. Son président est le Dr Werner Bormann.

Mikhaïl Gorbatchev et la communication

«La communication directe entre les hommes, c'est grandiose. Sans communication totale ni compréhension réciproque entre les peuples, les hommes politiques ne peuvent pas faire grand'chose.»

À l'école

L'université technique Eötvös Lorand de Budapest (Hongrie) est ouverte aux étudiants de tous pays désirant obtenir un diplôme d'espérantologie. Les conditions d'admission sont la possession d'un diplôme universitaire et la connaissance de l'espéranto.

Le Dr Phuong Nam et le groupe de l'Université de Catho (Vietnam) ont organisé de nombreux cours d'espéranto durant l'année du centenaire, pour les enseignants de langues étrangères et les étudiants (plus de 400 personnes).

Durant l'année scolaire 1986-87, l'espéranto a été enseigné à 1 200 élèves de 26 écoles de Cuba par 60 enseignants.

Musique rock

Une nouvelle association vient d'être fondée sous le nom «Eurokka» dans le but de promouvoir l'espéranto dans les groupes de rock et les groupes de rock qui chanteront en espéranto. Eurokka s'occupe de l'administration de locaux pour l'entraînement des groupes de rock. [tiré de *SAT-Amikaro*, service de presse, juin 1988]

Apprendre l'anglais

Le professeur Denis Keete, licencié en sciences économiques et professeur de langues (anglais, allemand et espagnol) est l'auteur de trois ouvrages sur l'anglais et prépare actuellement un doctorat exposant une méthode plus rapide pour l'étude de l'anglais. Sa méthode se base sur l'étude préalable de l'espéranto qu'il enseigne au Lycée d'espéranto de Madrid. La valeur de l'espéranto comme propédeutique à l'apprentissage des autres langues a déjà été démontrée par des expériences réalisées dans divers pays, et pour la première fois en Angleterre, en 1921. [tiré de *SAT-Amikaro*, service de presse, avril-mai 1988] □

Correspondre en espéranto

(collections, ondes courtes, enregistrements sonores)

Un des moyens le plus répandu, le moins coûteux et le plus formateur d'utiliser l'espéranto est la correspondance avec l'étranger. Pour certaines personnes, la correspondance est la seule raison pour laquelle elles ont appris l'espéranto.

Pourquoi correspondre

Plusieurs d'entre nous ont, ou ont eu des correspondants, de diverses langues. Nous savons que des amitiés peuvent facilement se créer ainsi, et bien des choses intéressantes nous sont apprises sur le pays du correspondant. Avec l'espéranto, on n'est plus limité aux pays où l'on parle le français ou l'anglais. On peut trouver des correspondants espérantistes dans la plupart des pays du monde.

La correspondance en espéranto est un très bon moyen d'utiliser et d'améliorer sa connaissance de la langue internationale. Il est beaucoup plus facile, quand on est débutant, de correspondre, un dictionnaire à côté de soi, que de prendre part à une conversation, toujours trop rapide. Pour beaucoup d'espérantistes isolés, la correspondance reste le seul moyen d'utiliser l'espéranto. Le correspondant espérantiste n'est jamais en état d'infériorité, car l'espéranto demeure une langue seconde pour chacun des correspondants.

Comment correspondre

L'Association mondiale d'espéranto a mis sur pied un service de correspondance : *Koresponds Servo Mondskala*. Pour avoir des correspondants, on doit écrire **en espéranto** à l'adresse suivante :

S-ro Robert Lorens
«Les Hortensias 2»
121 bis, boul. Napoléon III
F-06200 NICE
FRANCE

et donner son nom, son adresse, divers renseignements personnels (âge, etc.), ses sujets préférés, les pays dans lesquels on veut correspondre. On doit aussi inclure deux coupons-réponse internationaux (que l'on peut acheter dans les bureaux de poste; attention, ils doivent porter le cachet de la poste).

On peut aussi insérer (et lire) des petites annonces dans les revues espérantistes. La plupart des revues nationales ou internationales ont une section « Korespondi deziras ». Celle de *Luma*, bulletin de l'Association canadienne d'espéranto, occupe quelques pages à chaque parution. Ces petites annonces sont souvent payantes.

Où correspondre

Grâce à l'espéranto, on peut correspondre un peu partout, mais certains pays sont plus faciles d'accès que d'autres. Dans certains pays de l'Est, dont la Pologne, habitent un grand nombre de *korespondemuloj*.

Les mouvements espérantistes de certains pays d'Afrique, d'Asie et d'Amérique latine connaissent ces temps-ci un départ prometteur. Il s'agit le plus souvent de personnes à faible revenu (du moins selon nos critères) et isolées, dont la langue maternelle est souvent très différente de la nôtre et de l'espéranto. La correspondance est souvent la seule forme de liaison que ces personnes peuvent avoir avec des espérantistes étrangers. Si vous voulez correspondre avec des pays du Tiers-Monde, vous pouvez obtenir plus de renseignements à ce sujet en écrivant en espéranto à :

Hans Bakker
Kastelenstraat 231-II
NL-1082 EG AMSTERDAM
PAYS-BAS

Pour les collectionneurs

Dans les petites annonces dont nous avons parlé précédemment, on peut observer que de nombreux espérantistes sont des collectionneurs: de timbres et de cartes postales, notamment. C'est sans doute parce que l'usage de l'espéranto permet d'entrer plus facilement en relation avec des collectionneurs répartis sur les cinq continents. Et il n'est pas nécessaire d'avoir une connaissance de l'espéranto littéraire pour s'échanger des timbres.

Si vous êtes un collectionneur, vous pouvez faire connaître votre passion dans les petites annonces ou au *Koresponda Servo Mondskala*, ou devenir membre de la :

Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo
de Esperantaĵ-Kolektoj
p/a Paulsson
Skytteholmsvägen 29
S-171 44 SOLNA
SUEDE

Et les ondes courtes

De nombreuses émissions radio ont lieu chaque semaine en espéranto, le plus souvent sur ondes courtes (ce qui permet de capter ces émissions, même si l'auditeur est très

éloigné de l'émetteur). Les principales stations sont *Radio Suisse Internationale*, à Berne, *Radio Polonic*, à Varsovie, *Radio Vatican*, *Radio Pékin*, la *Radio autrichienne* et *Radio Zagreb*, en Yougoslavie. D'autres stations émettent aussi sur la bande MF.

Si vous possédez un récepteur à ondes courtes, vous pouvez recevoir l'horaire le plus récent en en faisant la demande à la S.O.E.

Enregistrements sonores

Si les ondes courtes vous sont inaccessibles et que vous voulez quand même écouter les discours de personnalités espérantistes, vous pouvez vous tourner vers le service d'enregistrement de l'Association mondiale d'espéranto. Il possède une importante collection d'enregistrements sonores, de discours, de musique, de pièces de théâtres, d'émissions de radio, dont on peut obtenir des copies.

Un catalogue de ces enregistrements est disponible. Il suffit d'en faire la demande et d'envoyer une enveloppe pré-affranchie à :

Magnetofona Servo
Rüdiger Eichholz
R.R.1
Bailieboro (Ontario)
KOLIBO ☐

Kiel fartas la Societo

La 27-an de aŭgusto okazis la jara ĝenerala kunsido de la Esperanto-Societo Kebekia. Ĝin ĉeestis deko da homoj, tiel ke la kvorumo (malplej granda nombro, por ke la kunveno estu decidrajta) ne estis atingita. Ĉu la membroj ne interesiĝas pri sia Societo? Nu.

Ĉi tiu artikolo volas vidigi kia estas la nuna stato de la Societo,

kiel oni ĝin prezentis dum la kunsido. Membroj, kiuj deziras pli kompletan bildon, povas venigi la tutan protokolon de la kunsido.

Financoj

Kiel antaŭvidite pro la multa agado dum la Jubilea Jaro, E.S.K. **malprofitis** je 210.69\$. La financa stato estas tamen tre sana :

la kotizoj kreskis de 308 \$ ĝis 844 \$ en unu jaro !

Ni tamen plu posedas grandan stokon de ne venditaj (kaj ŝajne neniam vendotaj) Jubileaj **pinglo-insignoj**. Se iu havas ideon (ĉu vendi ilin al kolektantoj ?), bonvolu sciigi ĝin al la estraro.

Varbado

Ni ja malprofitis, sed ni multe varbis. Interalie, kostis multe (pli ol 600 \$) la **Bildkarta Ekspozico** okazinta en junio 1987-a. Per ĝi E.S.K. oficiale malfermis la Jubilean Jaron. Sed ĝi ne utilu nur unu fojon. Kelkaj paneloj estis ekspoziciataj en Amablo : estis anoncetoj pri la unu-vespera evento en tri semajnaj gazetoj. Plie, Pierre Chicoine nun laboras, por ke la Montrealaj libropruntejoj vidigu la Bildkartaron al siaj vizitantoj. Ĉu iu havas alian ideon pri tio ?

Cetere, E.S.K. pretigis **novajn varbilojn**. Nia Societo nun disponas je propra ĝenerala varbilo, kiun vi ricevis kun la lasta numero de *la Riverego*. Jes ja, temas pri tiu verda faldfolio. Kion vi opinias pri ĝi ? Cetere, ni presigis kvar temajn informfolion : la teksto de la dua aperas en ĉi tiu bulteno. Plie, estas nun afiŝeto por reklami Esperanton ie ĉie. Ĝin oni uzu kune kun la kuponaroj. Reklamu Esperanton en via loĝloko !

Membroj kaj estraranoj

Dank'al tiu varbado, dank'al la pluraj artikoloj aperintaj en diversaj revuoj, la membraro de E.S.K. daŭre kreskas. Komence de

septembro, ni entute estis 161 membroj : 66 ordinaraj membroj kaj 95 Amikoj de Esperanto. La membrolisto estas havebla : oni sendu koverton kun afrankon je 0,57 \$.

El tiuj, kvin homoj pli laboras kadre de la Esperanto-Societo Kebekia kaj konsistigas la estraron de E.S.K. Ili estas : Normand Fleury, prezidanto ; Rom Séguin, vicprezidanto ; Sylvain Auclair, sekretario-kasisto ; Victor C. Jaar kaj Cyrille Robidoux, estraranoj. Grandparte dank'al iliaj regulaj kunvenado la Societo kreskas.

Cetere _

Bonvenaj estas ĉiuj membroj, kiuj volas kontribui al ĉi tiu bulteno. Ni ja devus konsistigi **redaktan komitaton** kaj plibonigi *la Riverego*.

E.S.K. ricevis **donace de la Eduka Fondajo Carson** okdek ekzemplerojn de la libro : *Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur*. Dankegon. Tiun libron ni nun ekuzos por la progresiga kurso okazigata dum la renkontigoj. Cetere, la estraro decidis grandparte disdoni la librojn al la libropruntejoj de la Kebekiaj kolegioj (Cégep). Tiel, tra tuta Kebekio, la interesitaj studentoj povos lerni Esperanton kaj facile kontakti la movadon.

Ja estos **Parko Esperanto** en Montrealo, en la kvartalo Pointeaux-Trembles. Verŝajne post du jaroj. Ni devos atendi, ke la urbo havu monon por parkigi tiun lokon, nun uzatan kiel tendumejon. □

Comment va notre Société ?

C'est le 27 août que s'est tenue à Montréal l'assemblée générale de la Société québécoise d'espéranto. Avec une dizaine de participants, le quorum n'a pas été atteint. Les membres se désintéresseraient-ils de leur association?

À l'occasion de l'assemblée générale, on a brossé un tableau de la situation actuelle de la Société. En voici un aperçu.

Finances

Comme prévu à cause des nombreuses activités tenues pour le Centenaire de l'espéranto, la S.Q.E. a dû essuyer un déficit de 201,69\$. Mais tout va quand même très bien: les cotisations ont grimpé, en un an, de 308\$ à 844\$!

Nous sommes cependant pris avec un bon stock de macarons. Toutes les idées pour les vendre (peut-être à des collectionneurs) sont les bienvenues.

Information sur l'espéranto

Ce n'est pas pour rien que la S.Q.E. a été déficitaire. L'**exposition de cartes postales**, tenue en juin 1987 au Jardin Botanique et par laquelle la S.Q.E. a inauguré le Centenaire, a coûté plus de 600\$. On doit certainement la réutiliser. Quelques panneaux ont été exposés pendant une soirée, à Saint-Amable. L'événement avait été annoncé dans trois hebdomadaires de la région. De plus, Pierre Chicoine s'affaire à lui faire faire le tour des Maisons de la Culture de la Ville de Montréal. Quelqu'un aurait-il d'autres idées?

La S.Q.E. a aussi préparé de **nouveaux documents d'information**. Tout d'abord le dépliant que vous avez reçu avec le dernier numéro de *la Riverego*. Qu'en pensez-vous? En plus, nous avons fait imprimer quatre feuillets thématiques, dont *la Riverego* publie le contenu, un par numéro. En dernier lieu, une petite affiche à utiliser avec les blocs de demandes d'information. Faites-en venir en mettez-en un peu partout au Québec!

Les membres et le conseil

Grâce à l'information, grâce aux articles parus dans plusieurs revues, la S.Q.E. compte toujours plus de membres. Au début de septembre, nous sommes 161 : 66 membres ordinaires (espérantistes) et 95 Amis de l'espéranto. La liste des membres est disponible contre une enveloppe affranchie de 0,57\$.

Parmi tout ce monde, cinq personnes ont décidé de consacrer plus de temps à la S.Q.E. et sont membres de son conseil. Il s'agit de: Normand Fleury, président; Rom Séguin, vice-président; Sylvain Auclair, secrétaire-trésorier; Victor C. Jaar et Cyrille Robidoux, administrateurs. C'est en grande partie grâce à leurs réunions régulières que la Société peut progresser.

En vrac

Tous les membres sont cordialement invités à contribuer à *la Riverego*. Il est nécessaire de mettre sur pied un comité de rédaction et d'améliorer ce petit bulletin.

Nous avons reçu en cadeau du *Eduka Fondajo Carson* 80 exemplaires du livre *Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur*. Un grand merci à cette fondation qui a pour but de subventionner, partout au monde, des projets reliés à l'enseignement de l'espéranto. C'est ce livre que nous utiliserons désormais pour les cours tenus lors des rencontres de la S.Q.E. En plus, le conseil a décidé d'en distribuer plusieurs dans les Cégeps, partout au Québec. Tous les cégépiens intéressés par l'espéranto pourront donc facilement l'apprendre et entrer en contact avec le mouvement.

À Montréal, dans le quartier Pointe-aux-Trembles, le Parc Espéranto s'en vient. Dans deux ans... C'est le délai nécessaire avant que la ville puisse débloquer des fonds destinés à aménager ce qui est pour le moment un camping. □

Montrealaj paĝoj

de Patriko Mongeau

Nova prezidanto

Nia eksprezidantino Turan Sagafi demisiis pro manko da tempo. Johano Sorel proponis Silvanon Quirion kiel novan prezidanton dum kluba renkontiĝo. Silvano tuj akceptis. Gratulon kaj dankon al li. Li estas tre entuziasma kaj jam partoprenis unuan estrarkunsidon.

Plus d'attention pour les débutants lors des rencontres du club

Le club ayant pour but de donner l'occasion aux Montréalais de pratiquer l'espéranto, nous avons l'habitude de ne parler que cette langue durant les rencontres. Par ailleurs, comme nous avons des membres anglophones, francophones et allophones, l'espéranto a tout naturellement sa place au club. Malheureusement, cette pratique rebute souvent les débutants, qui ne parviennent pas les premières fois à tout saisir et qui choisissent parfois d'attendre d'être plus à l'aise avant de revenir au club. Souvent par la suite, par manque d'encouragement, ils ne continuent pas leur apprentissage de la langue et nous les perdons définitivement.

Afin de remédier à cette situation malencontreuse, notre nouveau président Sylvain Quirion a décidé d'introduire une nouvelle partie à nos rencontres, s'adressant particulièrement aux débutants:

Débutants, préparez-vous

À chaque première rencontre du mois, les débutants peuvent apporter un texte qu'ils ont écrit eux-mêmes en espéranto. Tous les textes seront relus et corrigés pendant la soirée, et ils seront corrigés par les plus avancés. Ainsi, non seulement chacun aura l'occasion de pratiquer et de se faire aider, mais on aura l'occasion d'entendre aussi les textes des autres, qui devraient être écrits en espéranto facile, et de profiter des commentaires qu'ils recevront. Lancez-vous sans gêne. Ce n'est qu'en utilisant l'espéranto que vous l'apprendrez.

Programo de la venontaj monatoj

La programoj de la monatoj oktobro kaj novembro ne estas deciditaj. En decembro, kiel pasintjare, ni havos poezion vesperon. Ĉiuj povos laŭlegi poemon, kiun ili mem verkis, aŭ kiun ili elektis.

Ekde septembro, la liberaj vesperoj (je la tria lundo de ĉiu monato) okazos en restoracioj. La rendezuo estas je la 18a horo kaj duono. Ni elektis kvar restoraciojn diverstipajn kies liston sekvas por la venontaj monatoj. La vesperoj de la unuaj lundoj daŭre okazos ĉe la Esperanto-domo sur la strato De Bordeaux ĝis decembro. Por la venonta jaro, nia prezidanto estas diskutanta kun la urba administracio por havigi al ni lokon.

Kunvenejoj de la liberaj vesperoj ĝis decembro

- | | |
|---------------------------|---|
| 19an de septembro: | Restoracio Le Jardin (angulo de stratoj Drolet kaj Marie-Anne) |
| 17an de oktobro: | Restoracio Le Taj, 2077, strato Stanley
<u>Tiam okazos diskuto pri la solidareco de la esperantistaro kun la anoj de internaciaj esperantistaj kanadaj paroj</u> |
| 21an de novembro: | Restoracio Le Commensal (sur strato Saint-Denis, tuj sude de strato Sherbrooke) |
| jaŭdon, 15an de decembro: | Restoracio Mazurka, 64, strato Prince Arthur oriente |

atentu: en decembro, la libera kunveno en la restoracio Mazurka okazos jaŭde kaj ne lunde, okaze de la Zamenhofa festo. Por tiu evento, ni elektis polan restoracion!

Cours pour débutants

Comme depuis déjà quelques années, le Club offrira, dès la fin de septembre, un cours d'espéranto s'adressant aux débutants. Il se donnera au rythme d'un soir par semaine, pendant onze semaines, au 6358, rue de Bordeaux. Son coût sera de 55\$. Pour recevoir de plus amples informations et pour s'inscrire, téléphoner à Sylvain Auclair, au 270-8856.

Aŭtuna renkontiĝo – rencontre d'automne

Kiam – Quand : 14-16 de oktobro/ du 14 au 16 octobre.

Kie – Où : Domaine Scout Saint-Louis de France, 161, Rang des Chenaux, Saint-Louis de France. (819) 374-1066. Apud/Près de Trois-Rivières.

Prezo – Prix : ĝis la 7-a de okt./jusqu'au 7 oct. :

15 \$ par personne/po 15 \$ home

40 \$ par famille/po 40 \$ familie

post la 7-a de okt./après le 7 oct. :

20 \$ par personne/po 20 \$ home

50 \$ par famille/po 50 \$ familie

La prezo inkluzivas la partoprenon, du tranoktadojn, du mantenmanĝojn. Estas kuireblecoj. Oni nepre kunportu dormsakon aŭ litukojn, kaj ĉiajn tualetaĵojn. La ĉambroj estos sesopaj. Le prix comprend l'inscription, deux nuitées et deux déjeuners. On peut faire sa propre cuisine. Il est nécessaire d'apporter un sac de couchage ou ses draps, et tout son nécessaire de toilette. Les chambres sont pour six personnes.

Programo – Horaire

vendr. vespere/soir	interkona vespero/discussion libre
sa. matine/matene	9-10 : sinprezentado/présentation des participants 10-12 : sociaj ludoj/cours pour débutants
tagmeze/à midi	pikniko/pique-nique
posttagmeze/après-midi	vizito al Tri-Riveroj/visite de Trois-Rivières
vespermanĝo/souper	en Tririvera restoracio/dans un restaurant de Trois-Rivières
vespere/soir	arta vespero (kontribuoj bezonataj) – invito de la publiko/soirée artistique (vos contributions sont les bienvenues) – le public est invité.
dim. matine/matin	Speciala ĝenerala kunsido de E.S.K./cours pour débutants
posttagmeze/après-midi	libera/libre

Kiel atingi la ejon

El Montrealo, aŭtoŝoseo 40 : elirejo 196, al 55 suden. Elirejo 182, al 755 orienten. Elirejo 8 norde, al 157 norden.

El Kebeko : la aŭtoŝoseo 40 iĝas 755. Elirejo 8. Ĉe la halt-signalo, maldekstren. Ĉe la semaforo, dekstren en la 157 norden.

El la Suda Bordo (tra la ponto Laviolette) : elirejo 182, al 755 orienten. Elirejo 8 norde, al 157 norden.

Poste, por ĉiuj : vi veturas laŭ la strato Thibeau. Je la sepa semaforo, en la vilaĝo Sankta-Luizo-Franca, maldekstren al bulvaro Saint-Jean okcidenten. Vi preterpasos la preĝejon. Ĉe la fino de l' vojo, post 5 km, dekstren al Rang des Chenaux. Kiam ekaperos domoj dekstre, maldekstren en la unuan alirejon. Jen.

Comment se rendre au Domaine

De Montréal, par l'autoroute 40: sortie 196, qui mène à la 55 sud. Sortie 182, qui mène à la 755 est. Sortie 8 nord, qui mène à la 157 nord.

De la rive sud, par le pont Laviolette: sortie 182, qui mène à la 755 est. Sortie 8 nord, qui mène à la 157 nord.

De Québec, par l'autoroute 40. La route devient la 755. Sortie 8. À l'arrêt, tourner à gauche. Aux feux, tourner à droite sur la 157 nord.

Puis, pour tout le monde: vous êtes sur la rue Thibeau. Aux septièmes feux, au cœur du village Saint-Louis-de-France, tourner à gauche sur le boulevard Saint-Jean Ouest et passer devant l'église. Au bout du chemin, après 5 km, tourner à droite sur le Rang des Chenaux. Aux premières maisons à droite, prenez la première entrée à gauche. Vous y êtes.

Aliĝilo al la aŭtuna renkontiĝo – Formulaire d'adhésion à la rencontre d'automne	
Nomo :	
Adreso :	
poŝta kodo :	
Telefono :	Detaloj :

Sendu la aliĝilon kaj la ĉekon al la Esperanto-Societo Kebekia.

Envoyer le formulaire, accompagné d'un chèque, à la Société québécoise d'espéranto.

Société québécoise d'espéranto

C.P. 126, succ. « Beaubien »

Montréal H2G 3C8

(514) 495-8442

Formulaire d'adhésion - 1989 - Realiĝilo

Jen venis la tempo por realiĝi al E.S.K. Nove estas, ke oni povas aliĝi por unu, du aŭ tri jaroj, aŭ dumvive. Ekzistas la kutimaj membro-kategorioj: ordinara, sam-adresa (por homoj, kiuj loĝas kun ordinara membro) kaj favor-kotizo (por malriĉaj studentoj, senlaboruloj, k.s.).

Voici le temps de renouveler son adhésion à la Société québécoise d'espéranto. Les Ami-e-s de l'espéranto peuvent dorénavant s'inscrire pour un, deux ou trois ans. Si deux ou plusieurs personnes partagent la même adresse et veulent ne recevoir qu'un seul exemplaire de *la Rivero*, tous, sauf un, peuvent bénéficier du statut d'*Ami cohabitant*. Les Ami-e-s de l'espéranto n'ont pas le droit de vote.

Nomo _____

Adreso _____

_____ poŝta kodo _____

Telefono (____)____-____ Ago ____ Profesio _____

	1989	89-90	89-91
Ordinara membro (7 \$, 14 \$, 21 \$)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
Favor-kotiza membro (5 \$, 10 \$, 15 \$)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
Nova dumviva membro (175 \$)			<input type="checkbox"/>
Ami de l'espéranto (5\$, 10\$, 15\$)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

Sam-adresaj membroj (3 \$ jare kaj home) : bv. skribi kiom da jaroj (1, 2 aŭ 3) ; membres cohabitants (3\$ par année et par personne) ; veuillez écrire le

nombre d'années (1, 2 ou 3) : _____

Mi deziras donaci al E.S.K. - Je désire faire un don à la S.Q.E. _____ \$

La membroj de la Esperanto-Societo Kebekia povas membriĝi en la Kanada Esperanto-Asocio kontraŭ malalta kotizo, se ilia kotizo atingas la oficejon ĝis la fino de februaro 1989-a. La kotizo por unu jaro (ne ekzistas plur-jaraj kotizoj) estas 12 \$ por ĉiu homo (ne ekzistas kotizo por sam-adresaj membroj). Hoku ĉi tie se vi volas aliĝi al K.E.A kaj skribu [K.E.A.] apud la nomo de la sam-adresaj membroj, kiuj aliĝas al K.E.A. La ordinara kotizo de K.E.A estas 24 \$.

Kiom da aliĝoj al K.E.A. _____ x 12 \$ - _____ \$

La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Septembro 1988-a. N-ro 12-a.

Ĉi-numere :
Rapport des activités
Grava speciala ĝenerala kunveno
Rencontre automnale à Trois-Rivières
Nova poemaro en Esperantio
Correspondre en esperanto

Société québécoise d'espéranto
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal H2G 3C8